

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. —Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administreto: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

Por nia ĉeĥoslovaka abonantaro estas aldonita al tiu ĉi numero *t r a n s p a g i l o* de la poŝta ŝparkaso, kiun oni baldaŭ uzu por sendi aliĝon kaj la kongresan kotizaĵon al la XIII. kongreso de Esperanto en Praha!

PRAHA.

(Ĝia situacio kaj vidiindaĵoj.)

Praha, la XIII. kongresurbo, la ĉefurbo de la Ĉeĥoslovaka Respubliko, la iama sidejo de bohemiaj reĝoj, la historia centro de la bohema kulturo kaj la scenejo de historiaj okazintaĵoj, kiuj ofte tuŝis la tutan Eŭropon, pro sia pentrinĝa situacio kaj multegaj admirindaj konstruaĵoj, kiuj memorigas la tempojn longe forpasintajn. apartenas inter la plej belajn urbojn de la mondo. Sian admiron al ĝi esprimis ankaŭ la fama vojaĝisto Alex. von Humboldt, kiu tramigris la tutan terglobon.

Praha etendiĝante sur kelkaj montetoj, ĉirkaŭantaj la valon de la arĝentonda rivero Vltava (Moldavo), ebligas el kelkaj punktoj admirindan vidaĵon de sia belega panoramo. Sur unu el tiuj punktoj, sur la verda supro de montelo Petřín estas konstruita fera observa turo, sur kiu oni povas ĝui la plej belan vidaĵon sur la tutan urbegon eĉ la vastan ĉirkaŭaĵon. Tie, en direkto orienta, senpere sub la monteto, oni vidas la brilantan nivelon de Vltava, kies ambaŭ bordoj estas kunligitaj per vico da belaj pontoj, inter kiuj la ponto nomata »most Karlův« estas la plej malnova kaj historie plej rimarkinda. Sur tiu ĉi loko staris en la X. jarcento ponto ligna kaj tie, en j. 1167, Judita, edzino de reĝo Vladislav II. lasis konstrui ponton ŝtonan, kiu kaŭze de superakviĝo ruiniĝis en j.

1342. La nuna ponto estis fondita de reĝo Karel IV. en j. 1357. Kun tiu ĉi ponto estas ligitaj kelkaj historiaj okazintaĵoj: tie oni batalis en j. 1249, 1310--11, kaj en 1648 la svedoj tie ĉi vane penis venkoakiri la »Malnovan urbon«.

Bronza memorplato alfiksitita sur la pont-bariero anoncas ankaŭ, ke de tie ĉi estis (20. III. 1393) ĵetita en la riveron — laŭ ordono de la reĝo Václav IV. — Dro. Johano de Nepomuk, la riĉa vikario de ĉefepiskopo Jan z Jenštejna, kiu estis kontraŭulo kaj malamiko de la reĝo. (Johano de Nepomuk estis en 1729 de katolika eklezio deklarita por sanktulo. Memortago 16. majo.)

Ambaŭflanke de la rivero etendiĝas maro da domoj de la centtura urbo. Ĉiuflanke oni vidas pitoreskajn tegmentojn de antikvaj palacoj kaj al ĉiu el ĝi estas ligita peco de bohema historio. Sudoriente de ni sur la bordo de Vltava leviĝas la rokaro de Vyšehrad, kie staris la lulilo de bohema kulturo. Jam antaŭ Libuše estis tie ĉi surtronigataj la bohemiaj princoj kaj tie staris, ĝis la XV. jarcento, la reĝa kastelo. Kun Vyšehrad estas ligita vico da legendoj. — Laŭdire estas tie ĉi kaŝita la ora trezoro de Libuše kaj sub la roko, sur fundo de Vltava kuŝas la ora lito de tiu princino.

Vyšehrad travivis multajn uraganojn. En 1003 defendis sin tie princo Boleslav »ruĝhara« kontraŭ la pola Boleslav »brava«. En XI. kaj XII. jarcento okazis tie luktoj inter la Přemyslidoj. Gloran epokon por Vyšehrad signifas la regado de la unua bohema reĝo Vratislav II., kiu fondis tie ĉi (en 1070.) ankaŭ la preĝejon de sta. Petro kaj Paŭlo, kie li poste estis entombigita. Tie estis entombigita ankaŭ la lasta el Přemyslidoj, Soběslav II. (en 1180.). La sekvintaj reĝoj malzorgis pri Vyšehrad. —

De Karel IV. ĝi fine estis riparita, ĉirkaŭita de muregoj kaj tie estis konstruita nova palaco. Vyšehrad nepostvivis la husanajn militojn. Post malvenko de Sigismundo (1426.) estis la palaco elrabita kaj parte ruinigita. La reston finigis en 1622. la soldatoj de Ferdinand II. El la malnovaj konstruaĵoj staras nuntempe tie ĉi sole la preĝejo, la kapelo de Sta. Martin kaj la dekaneco. Apud la preĝejo estas nuntempe tombejo, la ripozejo de multegaj bohemiaj eminentuloj.
(Daŭrigota.)

○○○○

T. G. MASARYK 71-JARA.

La 7. de tiu ĉi monato atingis la bonfama filozofo, profesoro Dr. Tomáš Garrigue Masaryk, la ŝatata prezidento de la Ĉeĥoslovaka Respubliko sian sepdek unuan jaron. Pro la senkomparaj meritoj, kiujn li akiris dum la daŭro de la mondmilito vekante la konsciencon de la demokr. mondo, atentigante ĝin pri la maljustaĵoj farataj al lia nacio kaj per kiuj li sukcesis akiri novan sendependecon al sia lando, li fariĝis plej granda heroo en la historio de bohema nacio. Do, ne estas mirinde, ke ĉiu vera bohemo kaj slovako senkompare lin ŝatas kaj amas. Nunjare, kiam Masaryk pasigis sian nas-

kotagon estante grave malsana, lia popolo kun tiom pli kortuŝa sindonemo memoris sian eminentan instruiston kaj gvidanton. Kaj se la tuta nacio memoris lian tagon kun tiom da pruvoj de amo, eĉ ni ne povas agi alie ol esprimi la plej sinceran kaj ardan deziron, ke la Sorto estu favora al ni kaj lasu inter ni ankoraŭ multajn jarojn nian bonecan, amatan »paĉjon«.

LITERATURO

LA PLEJ GRANDA ĜOJO.

(Skizo el reveno de Masaryk en liberigitan Ĉeĥoslovakion la 21. XII. 1918.)

Momenton brilis la suno, momenton grizaj nuboj kovris la ĉielon kaj neĝetis. Tamen apenaŭ iu tiom rimarkas. La sango pro ĝojo febre cirkulas, ĉiu emociigite atendas.

Fine — — —

Kanona pafo, rapida ekpafo — — kaj jam la himnoj kaj vokado »vivu« sonas de la stacidomo.

La lasta momento de la kvarjara atendado estas jam ĉi tie, sur la sojlo de la stacidoma konstruaĵo aperigas la Liberiganto, vizaĝo kontraŭ la vizaĝoj de la sopire atendantaj.

FELIETONO

B. TITTL:

MEMOROJ EL LA DUMMILITA TEMPO

(Daŭrigo.)

En la unua jaro de la milito, kiam la popola provizado estis ankoraŭ regula kaj sufiĉa, regis inter ni kaj en la tuta Aŭstrio ĝenerale, spirito sufiĉe trankvila — se oni povas paroli pri trankvileco dum milita tempo. Sed post unu jaro komencis aperadi simptomoj de malsato, kiuj konstante kreskis. Kaj la malsaton sekvis mizero ĝenerala. Aperis profitemuloj t. n. ĉenvendistoj, kiuj kaŝe aĉetis por grandaj sumoj ĉion, kio estis aĉetebla, kaj kiam aperis manko de tiu aŭ alia vivbezonaĵo, ili havis rikolttempon. Ĉiu komercaĵo ordinare trairis vicon da manoj de similaj eminentuloj antaŭ ol ĝi estis vendata al la publiko, kaj tiam la prezoj estis jam tiel altaj, ke al ordinara mortemulo estis preskaŭ neeble ion aĉeti.

Kiam oni havis vestaĵon trouzitan, tol-

aĵon disŝiritan kaj flikitan tiom, ke oni ne povis senerare konstati la materialon el kiu ĝi estis origine farita, tio ĉio estis elportebla. Sed neelportebla estis la malsato, kaj tiu en j. 1917. estis terura. Antaŭ la aprovizaciaj vendejoj staris ĉiam longegaj vicoj de personoj el ĉiuj klasoj kaj de ĉiu aĝo atendantaj la momenton, kiam oni komencos ion eldoni. Sed la vendejoj estis malplenaj kaj kiam oni alveturigis ion por disvendi, ĝi sufiĉis nur por kelkaj personoj kaj la aliaj devis atendi denove. Kaj la trankvilo de la publiko estis mirinda: En la vicoj, kiujn oni nomis »frontoj«, ĝi staris seninterrompe eĉ kelkajn tagojn kaj noktojn, atendante la eldonadon de pano bakita el majzo, terpomoj, faboj kaj hipokastanoj. Anstataŭ faruno oni vendis avenon, kies pintoj estis iom formuelitaj. Tion oficiale oni nomis »avena rizo«.

Por personoj havantaj neŝanĝeblan salajron estis tute neeble satmanĝi, ĉar ili ne povis pagi la sumojn, kiujn postulis la kaŝvendistoj por kelkaj nutraĵoj. Kiuj ofte tutan tagon ne manĝis, estis tre multaj. Multaj

Oni aŭdas laŭtan bonvenvokadon de ĉie resonantaŭ — — La ĝojo ne finiĝas — — La aŭtomobiloj unu post la alia ekveturiĝas. La orkestroj ludas kaj la muzikou akompanas salutado de la atendantoj.

Antaŭ la muzeo flagras flambonoj kaj malsupre sub ili ĉu la tapiŝo? — ĉu la herbejo? — ĉu la bukedo?

Sur la klimrando vidiĝas la freŝeco kaj koloroj de la nacie vestita junularo — centoj da knabinoj kaj junuloj mansigne salutas.

La salutoj alflugadas kvazaŭ de la tuta patrujo, de la bela fiera, libera patrujo.

La koro ĝojiĝas — — —

Mil kapoj vidiĝas en la fenestroj — —

Mil brakoj per mil tuketoj svingas — —

Eĉ bruado de la strata vivo ĉiam pli kaj pli grandiĝas kaj entuziasmigas.

La ĝojo trapenetris korojn de la atendantoj, ĝojo emociiganta ĝis la kapturniĝo.

En la unua homvico staras virino. Ŝi estas griziginta, nebela kaj malgrasa, kaj ŝiaj mamoj estas malmotigitaj de la laboro. Sed en la solena tago estas necese solene sin vesti — —

Io sur la kapo anstataŭas la ĉapelon. Pro entuziasmo kaj eksciteco tiu ĉi objekto forŝovis sin tute flanken ĝis la orelo.

Sed la virino tion ne atentis. Ŝi takte movas la piedon kaj per la maldelikata, raŭke sonanta voĉo ŝi kantas kune kun la aliaj per sia tuta animo.

konfesis tion, multaj ne, laborante ĝis plena elĉerpiĝo.

Mia tiama amiko, redaktoro Votava, nuntempe redaktoro de komunista gazeto »Rovnost« en Brno (kiu estis ĉefa gvidanto de komunistoj en Moravio dum ilia provo pri ŝtata renverso kaj pro tio antaŭ unu semajno estis kondamnita al 10 jara aresto), kelkfoje konfesis al mi, ke li ne manĝis tutan tagon. En 1917 mia patrino kolektis spikojn restintantajn sur la kampoj post la rikolto, la grenerojn ŝi muelis per kafmuelilo kaj el la »faruno« tiel akirita ŝi bakis...

Iam svenis, pro elĉerpiĝo kaŭze de malsatado, dum la deĵoro unu juĝisto. — Kiam oni lin senvestigis, oni vidis, ke anstataŭ tolaĵo li portas ĉifonaĵojn. Da similaj aferoj, tre bedaŭrindaj, mi povus rakonti centojn.

Milito milfoje malbenita kaj milfoje malbenitaj ĝiaj iniciatintoj, kiuj alkondukis la loĝantojn de la Centra Eŭropo al la plej alta grado de la mizero...

(Daŭrigota.)

La larmoj fluas sur ŝiaj vangoj — — —

Pro la ĝojo oni ankaŭ ploras — — —

Poste ekneĝis. La neĝeroj kiel grietoj kovris la vestaĵojn, kolumojn, kapotukojn eĉ la peltojn de la atendantaj homoj.

Dum la mallumo, ekestinta pro la neĝoblovado estis gaje kaj freŝe.

Eble ankoraŭ neniam falis la neĝo kvazaŭ dancante, tiel gaje ĝi neniam petolis.

Jen la kampara maljunulineto deviŝas la larmojn. »Ho Dio, ho Dio«, ŝi ĝemas.

Ankaŭ la lipoj de la apude staranta maljunuleto tremiĝas kaj samtempe ridetas.

Kaj ne malproksime staras junulo kun la karakteriza larĝa frunto, brilantaj okuloj, kaj levante la standardon li vokas: »Vivu patroto Masaryk!«

Jam oni vidas junulinojn — en la granda fenestro, kvazaŭ ili estus parto de la bukedo ĉe la muzeo.

Kiom da koloroj! Oni vidas riĉe falditajn manikojn de la »Piŝtana«^{*)} nacia kostumo, de »Kyjova«^{*)} la surtuton kaj la kapotukon de »Hodino«^{*)}.

Ĉiuj mansigne salutas svingante ĝoje per la tuketoj.

Ĉe la Nacia teatro denove brilas la torĉoj kvazaŭ ili invitadus al naciaj festoj.

Super ĉio plenblovas la standardoj — —

Humile kaj obeeme ili ektuŝadas la stangojn por denove suprenflugadi kaj ĝis la ĉielo levigadi pro ĝojo.

Mi iras hejmen — — —

Tra la stratoj sonas la kantado. Voĉoj, ridado kaj denove la kantado. Kaj mi ne povas forgesi momentojn travivitajn en la stacidomo. Mi vidas ankoraŭ Lian juniĝintan staturon kun la trankvila, sincera rigardo.

Mi vidas ankoraŭ Lian manon etenditan al Jirásek.^{**)} Ho, tiu ĉi manpremo estis pli signifa ol ĉiuj vortoj kaj paroladoj. Mi vidas eĉ la kortuŝiĝon kaj eĉ la rideton de Liaj lipoj.

Kaj senĉese mi aŭdas la vortojn de la Liberiganto: »Kion ni tute travivas, estas fabelo, sed fabelo efektiva — kaj granda kaj malgranda, forta kaj malforta, juna kaj maljuna, ĉiuj povas kunlabori.«

La Liberiganto, kiu donis kaj oferis ĉion, revenas kiel Venkinto la granda el la plej grandaj — —

Viro de la superhoma forto invitas ĉiujn kiel kunlaborantojn, la plej izolitajn same kiel la plej malfortajn.

Mi klimiĝas profunde antaŭ Vi kaj mi kisas la energian, fortan manon: por pruvi

^{*)} Piŝtany, Kyjov = urboj en Ĉeĥoslovakio; Hodino = nacie vestita viliganino bohema.

^{**)} Jirásek = fama bohema verkisto.

la amon, admiron kaj same danki por la travivitaj suferoj pro la giganta laboro kaj donacita plej granda ĝojo:

Car — ĉu io povas esti pli bela, pli ĉarma, pli ĝojiga ol la laboro kun la popolo por la popolo, se Vi vokas kaj nun Vi gvidas Gvidanto nia?

Tradukis

Rondeto de esperantistinoj en Praha.

ESPERANTISMO

XIII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

31. julio — 6. aŭgusto 1921 en Praha.

VII. Komuniko.

Kotizajoj: 25 frankoj (antaŭmilita valoro) = 5 dolaroj, 12 nederlandaj guldenoj, 20 ŝilingoj, skandinavaĵoj kronoj, germanaj markoj, 25 frankoj, liroj, dinaroj, drakmoj, leonoj b. r., pesetoj, ĉeĥoslovakaj kronoj, aŭstriaĵoj kaj hungaraj kronoj, polaj kaj finaj markoj. Gesamideanoj el la aliaj ŝtatoj pagas 25 francajn frankojn! Pliaj samfamilianoj pagas nur 60 perc. de la kotizajo. Post la 1. junio altiĝos la kotizajoj je 50 perc. — Ĉiu pagas en sia nuna ŝtata valuto! Za sumon sendu en rekomendita letero rekte al la ĝenerala sekretario! La ricevo de la kotizo estos venonte sole en ĉi tiu rubriko kvitata. Ĝis nun pagis la kotizon la sekvantaj numeroj: 8. 11. 26. 31. 36. 43. 103. 117. 121. 127. 139. 140. 141. 142. 143. 145. 148. 149. 151. 158. 159. 160. 161. 162. 163. 164. 165. 166. 168. 169. 173. 174. 175. 178. 179.

Aliĝoj: 132. so Ganĉev el Sofia, 133 so Balkányi — Budapest, 134. sino Döring, 135. so Döring — Freiburg, 136. so Rieck Greifswald, 137. sino v. Doorne, 138. sino de Boer — Rotterdam, 139. kaj 140. gesoj Maschl — Wien, 141. so Mees — Hago, 142. kaj 143. finoj M. N. Siebersteckenovy — Praha, 144. so Popper — Žilina, 145. so Friedrich — Košice, 146. kaj 147. gesoj Maraury — Huesca, 148. kaj 149. gesoj Bünnemann — Hamburg, 150. so Steiner Győr, 151. so Schrank — Kempten, 152. so Frankenberger — Bytčica, 153. so Faulhaber — Amsterdam, 154. so Kučera — Rakovník, 155. kaj 156. gesoj Langer — Haida, 157. so Ginz — Praha, 158. sino Mammen, 159. fino Andreassen — Grenaa, 160. so Nosek, 161. so Weinberg, 162. so. Pultz — Skřivany, 163. so Camescasse — Paris, 164. kaj 165. soj A. O. Janečková — Vítkovice, 166. so. Romčín — Drumpt, 167. so Pour — Přelouč, 168. Oficiala delegito de la F. E. I. — Milano, 169. so Oulehla — Skřivany, 170. so Kaweckí — Danzig, 171. fino Žáčková, 172. so Zedník — Berlin, 173. so Bittner — Zábřeh, 174. so. Chalcr — Tarasa, 175. so Jaroš — Místek, 176. sino Figuières — Alger, 177. fino v. Doorne — Rotterdam, 178. so. Alonso Sanz, 179. sino Alonso Aranzo — Madrid. —

Ĝis nun aliĝis el: Ĉeĥoslovakio 82, Nederlando 23, Germanio 23, Francio 12, Polio 10, Hispanio 8, Bulgario 5, Aŭstrio 4, Hungario 3, Italio 3, Danio 2, Svisio, Svedio, Danzig, Alĝerio po 1.

Garantia fundo: 4. so Döring — 100 Kĉ, 5. so Bruijn — 500, 6. so Faulhaber — 100, 7. so v. Doorne — 100. Gesamideanoj garantiu almenaŭ 100 ĉeĥoslovakajn kronojn!

Donacoj: sino Mammen kun siaj skoltaj lern-

antoj ankoraŭ 113 Kĉ, red. Jung — 30 Kĉ, so Friedrich — 400 Kĉ, skolto Darsen — 3 d. K., so Riedl — 25 Kĉ, so Bünnemann — 8 g. m., so Šimonek — Chicago 1000 Kĉ. Venonte sole ĉi tie oni dankeme kvitos la donacojn!

Kongresa kaso: 62 Kĉ 67 h enspezo por donacitaj 50 ekzempleroj de la 22a numero (bildoj pri Praha) de »Esperanto Triumfonta«.

Deponita mono ĉe la banko »Bohemia« en Praha: 1. Fino Benkema — 200 Kĉ, 2. so Krestanof — 41 Kĉ 50, 3. so Bruijn — 2.000, 4. so Döring — 100, 5. so Balkányi — 360 Kĉ.

Prezroj (hodiaŭaj) en Praha: 1. de la hotel-ĉambroj: 1. kategorio: a) unulita 10—37 Kĉ, b) dua provizora lito 10—20 Kĉ, c) dulita 25—77 Kĉ. 2. kategorio: a) 10—29 Kĉ, b) 10 Kĉ, c) 26—50 Kĉ. Oni intencas prizorgi ankaŭ loĝadon en privataj familioj kaj komunaj loĝaĵoj en lernejoj por neriĉaj esp. Notu Viajn tiurilatajn dezirojn en la de la L. K. K. sendota aliĝilo!

Il. de la maĝaĵoj: 1. kategorio: a) matenmanĝo (blanka aŭ nigra kafo aŭ teo kun butero aŭ kompoto, pano aŭ bulko 10—15 Kĉ. b) tagmanĝo inter la 12—2) à la carte (buljono, fiŝo aŭ bovaĵo, rostajo kun farunbuloj aŭ terpomoj, farunaĵo) 45 — 75 Kĉ, c) vespermanĝo à la carte (antaŭmanĝo kaj rostajo) 25—65 Kĉ. 2. kategorio: a) 5—7 Kĉ, b) 33—37 Kĉ, c) 25 Kĉ. (Krom tio 10% trinkmono.) — En restoracioj kostas bona tag — kaj vespermanĝo 10—20 Kĉ. Tre bongustaj kaj malkaraj estas la kolbasetoj vurstetoj kaj ŝinko de Praha. Bulkoj po 60 h. Biero 0.5 l — 1.30 Kĉ — 2.20 Kĉ.

Vojaĝaferoj: vidu la IV. Komunikon. Za VIII. Komuniko alportos prezorojn de la biletoj por ĉiuj pli gravaj fervolinioj el Praha.

Ĝlumarkoj oficialaj (3 malsamaj specoj dukoloraj) prezentantaj esper. steleton elirantova super la kastelo de Praha kaj la portreton de la majstro ĵus aperis: 1 peco — 10 helerojn, 100 pecoj — 9 kronojn ĉ. (kun afranko 10 Kĉ), pr eksterlando 100 p. — 3 francajn frankojn aŭ egalvaloran valuton sendotan en rekomendita letero. Mendadu tuj!

Korespondatao: Gesamideanoj! Legu la ĝisunuajn oficialajn komunikojn! Na demandu pri la komunikitajoj! Na malriĉigu la kongresan kason forgesante aldoni por respondo aŭ respondkupon aŭ afrankon en neuzitaj poŝtmarkoj! Demandu la ĝeneralan sekretarion sole pri aferoj rilantaj al la XIIIa! Por la Loka Kongresa Komitato

Aug. Pitlik,
ĝenerala sekretario
Praha III., Nerudova 40.

DIVERSAĴOJ

Alvoko al la vizitontoj de la Kongreso en Praha. La urbo de la »Kvara«, aranĝos la Internacian Antaŭ-Kongreson kaj invitas kore la vizitontojn de la XIII. Kongreso. Provizora programo: 28. de julio antaŭtagmeze. Vizito de la vidiadaĵoj de la urbo. Tagmeze komuna tagmaĝo en la »Granda Ĝardeno«. Vespere publika propapanda kunveno, poste ev. vizito de koncerto. 29an de julio antaŭtagmeze. Veturado per speciala ŝipo sur Elbe al Pillnitz kaj migrado. Vespere granda festo kun balo internacia. 30a de julio komuna veturado al Praha per se eble speciala vagonaro. La kongreskotizajo estos ankoraŭ komunikota. Per afabla helpo de la porfremdula asocio kaj de la polica kaj

poŝtista Esp. grupoj estos ĉio bone organizata. Venu multnombre, ni promesas agrablan restadon. Anoncu tuj per poŝtkarto vian partoprenon, ni poste sendos al vi ĉiujn niajn informilojn. La kongresa komitato: S-ino Prof. Hankel, Dro. Hch. Arnold, Karl v. Frenckell, W. Ranft Sekretario. — Adesu ĉion al nia oficejo Dresden-N Hauptstrasse No. 38.

Stranga polemiko. En nia januaro numero mi enpresigis artikolon »Prefere silentu« per kiu mi rifuzis atakojn de so. Ellersiek, redaktoro kaj eldonanto de »Esperanto-Praktiko« en Berlin, subskribitajn per pseudonimo, per kiuj li celis malutili la XIII. kongreson en Praha. La marta kajero de lia gazeto enhavas respondon al so. Ellersiek, skribitan de germana samideano loĝanta en Praha so. M.U.Dr. Bischitzky, kiu laŭ la enhavo tute koincidas kun miaj refutoj. So. B. diras, ke post la ŝtata renverso okazis en Praha kontraŭgermanaj tumultoj, sed ne tiagrade, kiel oni legis en germanaj gazetoj. Kontraŭe, li mem miris pri la mildeco de tiuj tumultoj, kiuj tre malofte direktis sin kontraŭ la vivaj estaĵoj, sed plejgrandparte kontraŭ la germanaj elpendaĵoj kaj aŭstriaĵaj emblemoj. Sekve ĝi estis tumultoj kiuj ne malofte estis eĉ tre humorplenaj. Pri la tumultoj okazintaj en la pasinta jaro so. dro. Bischitzky diras, ke »nek ĉeha, nek germana popolo aragiŝ ilin« kaj li konstatas ke ili okazis »same en ĉehaj kiel, en german-bohemaj regionoj.« En tiu tempo iradis granda aro da ĉehaj laboristoj al la parlamento, postulante, ke oni faru tuj trankvilon sur la stratoj, alie la laboristoj mem prizorgus tion. So. B. aldonas, ke en Praha (mi mencias ke eĉ en aliaj urboj) sur stratoj, en elektraj vagonoj, en komercejoj oni povas senge ne paroli germane kaj la policanoj ĝentile donas informojn ankaŭ al homoj petantaj ilin germane. So. B. fine diras, ke li ne estas abonanto de La Progreso kaj ne konas ĝin, sed kelkaj citaĵoj, kiujn enhavas la artikolo de so. Ellersiek lin konvinkas (mi jam diris, ke eĉ tiu citaĵo estis falsita), ke La Progreso nepre ne estas neutrala. — Konsiderante la vidpunkton de so. dro. Bischitzky mi konfesas, ke sur lia loko mi ne skribus alie. Kaj se mi nun estus sur la loko de so. Ellersiek, post tiuj klarigoj mi revokus la tutan enhavon de la malfeliĉa artikolo, kiu devas esti klasifikata kiel intenca ofendo de la bohema nacio kaj intenca malhelpado de la sukceso de la kongreso. (Kaj tiun ĉi duan intencon komprenis certe ankaŭ so. Dro. B., ĉar alie li ne estus respondinta. Do, ĝi restas fakto spite, ke so. Ellersiek diras delikate, ke tiu opinio estas ŝtultajo.) Sed anstataŭ agi kiel honesta homo li atakas min per tiaj esprimoj, ke legante ilin mi hontis — ke ni havas tian samideanon, kaj mi bedaŭris ke lian atakon de la kongreso mi ne preteriris en silento. Mi citas nur kelkajn perlojn de lia spirita produkto: »... malnoblaĵojn de so. Tittl,« »aroganta mensogo«, »tio estas ŝtultajo«, »ŝanatikulo« ktp. So. Ellersiek diras, ke en venonta numero respondos al mi »laŭmerite« onklo Tobias (ĝi estas pseudonimo de so. Ellersiek) kaj mi petas lin: Cesu jam, tiajn »argumentojn« mi hontus respondi, ne dromigu mian nomon en tia marĉo. Neniam plu en mia vivo mi volas havi kun Vi ion komuna.

B. Tittl.

Idista Laboro. Niajn idistojn tre doloras laboro de fino. Šupichová en junulara gazeto »Malý Čtenář« kaj ili jam faris kelkajn provojn malebligi la propagandon en tiu gazeto. Antaŭ unu monato tiel

denove okazis: So. instr. Lebd. riproĉas eraran informadon kaj li parolas pri la »mejlaj« paŝoj«, per kiu Ido progresas. »Struta politiko tie ĉi ne helpas!« — li diras kaj li estas tuta prava: Falsado kaj trompado de idistoj estas jam ĉie tiel konata, ke prudenta homo ne lasos sin delogi eĉ per la plej dolĉaj vortoj kaj promesoj de idistoj. Praktiko jam de longe finjuĝis inter Ido kaj Esperanto.

Kongresaj glumarkoj. So. kongressekretario Pitlík sendis al ni specimenojn de la ĵus aperintaj kongresaj glumarkoj. Ni povas diri, ke ilia ellaboro estas tre eleganta kaj delikata. La periorita bildeto sur blanka papero 6x4 cm prezentas la admirindan panoramon de la kastelo en Praha, super kiu brilas verda steleto. Jen la ponto de Karel IV., panoramo de la kastelo kun la sama ponto kaj kun bildeto de Zamenhof, la tria prezentas panoramon de la kastelo kune kun la turoj »blanka«, »nigra« kaj »Daliborka«, videblan de oriento. La glumarkojn oni eldonis en du koloroj: bruna (bronza) kaj nigreblua. — La prezo ne estas alta: 10 hel. por peco. Ni ne dubas, ke ĉiu samideano zorgos pri ilia plej granda disvastiĝo tra la tuta mondo.

Protektoro de la Kongreso. Laŭ privata sciigo al ni farita promesis so. Prof. T. G. M a s a r y k, prezidanto de nia respubliko, akcepti protektoraton de la XIII. kongreso.

El Bulgario. En gimnazio de K a r l o v o fondiĝis ĝelernanta Scienca Esp. Societo havanta 150 membroj. La societo projektas fondon de la Bulgara ĝelernanta esp. ligo.

El Francio. En Marseille estis fondita Esperantista Oficejo por akceli esp. movadon en la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Se iu samideano trapasos la urbon, ne forgesu viziti la oficejon. Se oni bezonas informojn komercajn, industriajn, turistajn aŭ aliajn, oni turnu sin kun fido al la oficejo, kies adreso estas: 38, rue Consolat, Marseille, Francio.

KRONIKO

La raporto pri la ĝen. kunveno de Ĉ. A. E. aperos en la venonta numero!

Studentaron kaj Junularon ĝenerale ni atentigas pri starigo de la Sekcio, laŭ ilia deziro fondiĝita ĉe Ĉ. A. E. Kiel reprezentanto de tiu sekcio estis en la komitato de la Asocio elektita so. F. Medek, Brno, Česká 6. Studentoj kaj junuloj pagas nur dunonan kotizaĵon 5 Kč se ili estas izoluloj, al ila loka propagando, tiel ke ili pagas al Sekcio kaj la plejparton de la kotizaĵo la Asocio cedas al ili loka propagando, tiel ke ili pagas al Sekcio sole 1 Kč por ĉiu membro. La Asocio helpas al la Sekcio ĉiurimede, donante al ĝia dispono diversan propagandan materialon, ebligante al ĝi kiel eble plej malmultekostan restadon en Praha dum la XIII. kongreso ktp. Aliĝojn kaj informojn sendu al so. Medek aŭ al sekretario de la Asocio.

Oficiala ekzameno de Esperanto en la komisiono por popolaj kaj burĝaj lernejoj de Moravio estis nomita so. Ing. Vincenc Kroužil, prof. de la industria lernejo en Brno, laŭ la decido de la ministerio por instruado de la 27. X. 1920 no. 67.199. Ni jam anoncis, ke por ĉehaj lernejoj en Bohemio tian oficon plenumas s-o. J. Eiselt, prez. de la Asocio.

Inĝenieroj kaj E. so. Ing. V. Kroužil en Brno faris du paroladojn pri E. en la Societo de inĝe-

nieroj kaj arĥitekturistoj. Por anoj de tiu societo li gvidas kurson kun 24 p. en ĉambro de la politika lernejo en Brno.

Policianoj kaj E. So. red. Weiner faris en Praha du paroladojn, kiujn partoprenis 1400 policianoj. Sekvis kursoj por 120 p. kvarfoje semajne. Praha havos do dum la Dektria ankaŭ policistojn parolantajn esperanton.

Fervojistoj kaj E. Kursoj en Brno, Olomouc kaj Břeclava. Oficiale instigitaj de la direkto fervoja en Bratislava, fervojistoj en jenaj urboj de Slovakio aliĝis al kursoj: Bratislava 46, Žilina 28, Leopoldov 23 kaj Nové Zámky 13.

Laboristoj. Senlaca propagandanto inter laboristoj so. J. Pech gvidas en Plzeň ĉiumerkrede tri kursojn por laboristoj: 4—5 horo, 7—8 kaj 8—9 vespere.

Granda printempa foiro en Praha uzis por sia reklamo E. La ekspozantaj firmoj komercaj estis atentigitaj pri E. per speciala flugfolio pri E. kaj komerco, kiun verkis so. R. Hromada kaj en la foiro disportis 10 membroj de Esp. Klubo en Praha.

Nacia propagando en E. Ukrainia diplomata misio en Praha eldonis ĉeĥo-esperantan flugfolion informantan pri la menstara Ukrainio, kaj ĝia situacio en la ekonomio de Eŭropo. Tradukis R. Hromada. La flugfolio estis disdonata al la vizitantoj de la Foiro. Nemultaj ekzempleroj estas riceveblaj ĉe Asocio, se oni sendas afrankon.

Komerco kaj E. Membroj, kiuj estas pretaj propagandi en komercaj rondoj povas ricevi certan kvanton da flugfolioj pri E. kaj komerco, pri kiuj ni parolas supre. Regulajn artikolojn pri E. alportas ĉiumonate Obchodní Rozhledy organo de absolventoj de komercaj akademioj. Redaktas ilin so. J. Mikš el Praha — Nusle.

Gazetaro kaj E. Krom oftaj notizoj pri E. en ĉiutagaj ĵurnaloj de Praha, kaj krom ĵus preparolitaj Obchodní Rozhledy, konstatan rubrikon pri E. alportas Hronské Listy en Bánská Bystřice (Slovakio) gvidas so. prof. inĝ. Jos. Píkl, prof. de de komerca lernejo. Ĉefartikolon pri E. alportas Svoboda en Kladno 1-3.

Praha. Esperantista Klubo kunvenas ĉiuvendre en kafejo Union. 18. II. Debato pri propagando dum Foiro, 25. II. so. Hromada pri E. kaj Komerca ĉambro de Paris. En ĉiu kunveno raportoj de so. Pitík pri kongresaj preparoj. 6. III. »Junularo« aranĝis konversacian ekskurson al Šárka, la 13. III. kun kursoj al Chuchle. Ĉiumerkrede tradukaj kunvenoj de Junularo.

Klubo esp. en Praha-VIII. aranĝis kurson, ĉiutage 7—8en la ĉambro de la popola lernejo Na Palmovce. Instruas J. Šídlo.

Esperantista klubo en Plzeň aranĝis la 12. februaro sian XVI. ĝeneralan kunvenon, kiun partoprenis 30 personoj. Ĉeestis ankaŭ delegitoj de la Laborista klubo en Plzeň kaj Esperantista societo en Doubravka. Oni elektis ĵenan komitaton: prezidanto so. inĝ. R. Novák, direktoro de la urba elektrejo; vicprezidanto so. Fr. Kavan, komercisto; sekretario so. Fr. Hahn, instruisto; protokolisto so. Al. Kasal, instruisto; kasisto so. In. Gross; bibliotekisto so. Al. Loukota; arĥivisto so. J. Brožík; revuisto so. B. Tittl; anstataŭantoj soj. E. Kubásek, F. Zikan kaj J. Herc; revizoroj soj. J. Horák, J. Pavlík kaj M. Starý. — La 27. de januaro aranĝis la klubo amuzan vespereton por festi la finigon de la vintra kurso, kiun gvidis so. redaktoro B. Tittl. La programon prizorgis la

kursoj, la membroj de la klubo kaj so. Fábera, violonvirtuozo. La vespereto havis belan moralan eĉ finanĉan sukceson.

Plzeň. Laborista soc. esp. aranĝas du kursojn de Esp. La 2. de aprilo okazos en la societa domo »Peklo« amika vespero esperantista dum kiu la Tamburina societo ludos esp. himnon »La Espero« kaj »Al la iratoj«. — La Esp. Klubo ricevis de la urba konsilantaro la permeson starigi grandan elmontrejon apud la ponton de Wilson, kiu estas la plej vizitata parto de la urbo.

Bánská Bystřice (Slovakio). So. prof. inĝ. Píkl instruis E. kiel nedevigan objekton en la dua semestro 1920. La kunveno de instruistoj en la komerca (ŝtata) lernejo metis en la proponon de instruata plano de komercaj lernejoj instruadon de E. du horojn ĉiusemajne kaj ĉiuklase.

Český Brod. Kurson gvidas so. Fr. Pátek, distrikta lerneja inspektoro, en la ĉambro de la popola lernejo, por 65 p.

Holešov (Moravio). Propaganda parolado de f-ino A. Janalíková la 12. I. por ĝeinstruistaro, la 30. I. por publiko. Sekvis kurso, kiun gvidas en nomo en Osvětový sbor so. Loveček.

Val. Meziříčí. Propaganda parolado de f-ino Janalíková el Bystřice p. Hostýnem. Rezultis kurso de Osvětový sbor, gvidata de so. Loveček el Holešov.

Karlovy Vary (Karlsbad). En tiu ĉi mondkonata, banurbo fondiĝis nova Grupo de ĉeĥaj esp-istoj. Prez. so. V. Němec prokuristo de Živnostenská banka. Ĉar multenombraj bangastoj diversnaciaj apartenas inter la klientaro de tiu ĉi banko, ĝi presigis ankaŭ esperantan tekston sur folioj, kiujn ricevas ĉe ĝia kaso ĉiu kliento atendanta tie ricevon de mono.

Kladno. La 4. II. la Osvětový sbor aranĝis paroladon pri E. kaj ĝia praktika uzado. Parolis so. A. Pitlík. Klubo esp. estas restarigota.

Olomouc. Novan kurson en Lidová škola gvidas so. instr. Neuzil. En alia kurso en Novosady instruas so. Kudela.

Škvrňany ap. Plzeň. Nova Klubo estis fondita la 13. II. Prez. so. Boh. Vainar.

En la venonta numero ni publikigos adresojn de ĉiuj grupoj esp. Kie ŝanĝiĝis la adresoj, oni bonvolu sendi al la sekretario la raporton pri rezultatoj de ĝeneralaj kunvenoj.

Praha la 17. III. 1921. Rud. Hromada.

Val. Meziříčí. La 27an de februaro 1921 estis starigita tie ĉi la Esperantista Rondeto nome »Progreso«. Prezidantino estas f-ino Ličková Mar., instruistino, VP. s-ro Stromčík Oskar, studento, Sekr. s-ro Strouhal Frant., studento, kaj kasistino f-ino Macháčková Žofie. Membroj kunvenadas en ĉiu dua dimanĉo je la 2.30 horo postatagmeze en la kolegio por instruistinoj.

Nepomuk. Kurso de Esp. por 50 personoj estas aranĝata en burĝa lernejo. Instruas so. Rud. Petr, posedanto de drogerio.

Telč. Kultura korporacio de Telč aranĝas en burĝa lernejo publikan kurson de Esp. Instruas so. Kasalý, prof. de reala lernejo.

Žilina (Slovakio). Librovendisto so. O. Trávníček aranĝis malgrandan esp. ekspozicion. — En la knabina lernejo komencis la 1. de marto esp. kurso por 32 partoprenantoj sub direktado de so. A. Janz. Propagandaj afiŝoj en stratoj kaj elmetejoj. Artikolo pri Esp. en la loka »Právo Ludu«.

Liptovský Hrádok (Slovakio.) So. Alex. Kudlička aranĝos publikan kurson de Esp.

Škvřňany ap. Plzeň. La 20. de februaro estis tie ĉi fondita nova Esperantista Klubo. La Esper. Klubon el Plzeň reprezentis soj. Kavan kaj Gross. La Klubo nun araĝas ĉiudimanĉe antaŭtagm. La kurson por progresintoj, gvidatan de so. Tittl.

Letero el Vieno. La 16. de t. m. mi ricevis el Vieno leteron de germana samideano, kiu enhavis ĉi tiun tekston: »Tre estimata Sinjoro! Aŭdu la ekkrion de malfeliĉa samideano, kiu troviĝas en tre granda mizero. Mi estas longjara esperantisto jam de la jaro 1907 kaj ankaŭ ofte mi jam korespondis kun Vi. Nuntempe mi nur vegetas, ne vivas. Mian tutan bibliotekon, miajn librojn, la trezoron al mi karan mi devis forvendi, nur por akiri monon por loĝejo, nur por havi ŝirman tegmenton en la vintra tempo. En mia granda, senkulpa mizero mi turnas min al Vi kaj surgenue petegas Vin: Kompatu je mi, helpu al mi en mia mizero per pruntendono de kvindek ĉeĥosl. kronoj, kiujn mi iom post iom al Vi partopagi solene promesas. Ho, aŭdu mian vokon, denove surgenue mi petegas Vin!«

— La skribinton de tiu, ĉi letero, kies nomon pro klaraj motivoj mi ne volas anonci publike, mi ekkonis per redakcia korespondo kiel homon tre vigan kaj talentitan, kun bona karaktero, kaj tial mi prezentas al mi, kun kia abnegacio li batalis antaŭ ol li decidigis forsendi tiun leteron. Memkompreneble, ke mi faris mian samideanecon devon, sed mi kredas, ke inter ni estas almenaŭ kelkaj bonstataj samideanoj, kiuj povas ankaŭ helpi. Kaj al ili mi min turnas kun mia peto: Donacu ankaŭ kelkajn kronoj, helpu al homo malfeliĉa. Vian oferon mi juĝos kvazaŭ ĝi rilatus min mem. La donacojn ni notos en La Progreso sub la devizo »Al Viena studento«. Oni ilin afable sendu al la: Administracio de la Progreso en Plzeň. — Mi atentigas, ke so. administristo Kavan kaj so. ĉefing. R. Novák estos revizoroj de tiu ĉi kolekto. B. Tittl.

Al ĉiulandaj ĝeinstruistoj! Estante aranĝantino de faka kunveno pedagogia ĉe la XIIIa. universala kongreso esperantista en Praha, mi petas ĉiulandajn ĝeinstruistojn pri afablaj proponoj rilate tiun ĉi laboron. Ĉion sendu (kun respondkuponon aŭ neuzitaj poŝtmarkoj) al Julie Šupichová, faka instruistino en Praha II. 2032. Ĉeĥoslovakio.

BIBLIOGRAFIO

(Recenzisto Dro Silaba.)

Tria originala verko, kiu aperis en la lastaj semajnoj, estas romano *Pro kio?*, kiu aperis en »Nova Esp. Biblioteko« kiel no. 6. Ĝin eldonis »Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek«, Berlin S. 59. La aŭtoro estas nolita per pseŭdonimo »Argus«. La libro estas 158 paĝa 15 x 11 cm. kaj kostas 8.10 K. — La verko sin prezentas kiel »kriminalromano« kaj oni povas ĝin bone kompari kun la kriminalromanoj de ordinara tipo. Ĝia stilo estas bona, sed en la teksto oni trovas kelkajn ne kutimajn esprimojn: »Ŝi estis tute kaptita de li, kiel jam kelk — iu alia sinjorino antaŭ ŝi.« (Paĝo 29.)

»Se li rigardis onin per siaj grandaj okuloj...« (Paĝo 84.) K. a. — La libron oni povas rekomendi pro ĝia interesa enhavo. (Daŭrigota.)

oooo

DEZIRAS KORESPONDĤI.

(La enpresko kostas 2 Kĉ.)

Staňkov 217 u Domažlic. (Ĉeĥoslov.) So. Fanuš Ernst, dez. koresp. kun fraŭlinoj-samideaninoj el Plzeň kaj ĝia distrikto.

Val. Mezříčci (Ĉeĥoslov.), Tolstého 4. — So. Alois Nedomaňský, studento, interŝ. poŝtmark. kaj il. kartojn.

Ledvice u Duchcova (Ĉeĥosl.). So. Jos. Josífků, dez. koresp. kun samid. el ĉiuj landoj per p. krt. Li ankaŭ interŝ. poŝtn.

Dolany 85 u Klatov (Ĉeĥosl.). So. Petr Tichota, dez. koresp. per p. k. kaj let. kun ĉiuj landoj.

Dolany u Klatov (Ĉeĥosl.). So. Jar. Kučera, dez. koresp. per p. k. kaj let.

Přerov (Moravio, Ĉeĥosl.) str. de Kramář 31. So. Adolf Malík, dez. koresp. per p. k. kaj let. Interŝ. p. m. Deziras koresponde ludi ŝakon.

Krásno n. Bečvou (Moravio, Ĉeĥosl.). Křížná ul. 50. — So. Fred. Blum, studento, dez. koresp. per p. k. kaj let. Interŝ. p. m. Respondas tuj kaj ĉiam.

Bender — Tighina (Besarabia, Rumanio) str. Regina Maria 6. So. Lev Soltaŝchi, deziras korespondi per il. k.

Tokio, Komaba (Japanio), Faculté d'agriculture, Section vétérinaire. — So. S. Matsuba, deziras koresp. per. let. kun ĉeĥoslovaka veterinaro (bestkuracisto) pri fakaj aferoj.

Karlovo (Bulgario). Scienca Esp. societo »Ni venkos« deziras koresp. kun la tuta mondo. Oni skribu al so. Cv. Cvetkov, str. Vojniška 26, Karlovo, Bulgario.

Ústí n. Orlicí. F-ino M. Vincenzová, poŝtof. deziras koresp. per il. k. Ĉiam resp.

Ústí n. Orlicí. F-ino M. Morávková, koresp. per il. k. kun fremdlandanoj. Ĉiam resp.

Plzeň (Ĉeĥoslovakio), Rožemborská 1. So. Jar. Paichl, tipografisto en Laborista presejo, dez. koresp. pri nuntempaj temoj.

Barcelona (Hispanio), str. Laforja 222. — So. Daniel Garcia deziras interŝanĝi p. kart., let kaj p. m.!

Barcelona (Hispanio), str. Asturias 1, So. Emilio Rodés, deziras interŝ. p. k. let. kaj p. m.

Transmara reveno

de Ĉeĥoslov. legianoj el Siberio Ĉeĥoslovakion estos bilde eĉ vorte prezentita al esperantistaro en albuma formo, sur luksa papero, per 66 fototipiaĵoj el Siberio, Hindujo, Japanujo, Hindujo, k. t. p., k. t. p., en dimens. 36×25 cm.

La intereseĝa verko aperos en Majo 1921. — Prezo antaŭpage ĝis 30. Aprilo 100 Kĉ (fremdlande 10 Fr. sv.), post tiu dato 150 Kĉ (fremdl. 15 Fr. sv.)

Mendojn faru ĉe: Bohema Esperanto-Servo, Mrazany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

Atentu, Esperanto-grupoj!

Esperanto-insignojn kaj broĉojn ĉiuspecajn (escepte UEA. insignojn) Vi povas aĉeti por malaltaj prezoj nur ĉe mi. Modelkartonon kun prezoj por 35 Kč.

Mendu ĉe samideano

H. RÖHLICH, Jablonec n. N., Wassergasse 7. a.
Korespondo esp., ĉeĥa, germana.

Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci.

(Při objednávce poštou nutno připočísti
poštovné, jiných knih nevedeme.)

B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný	Kč 7.50
Slovník esperantsko-český, brož.	Kč 5.—
Časopis »La Progreso«, roč. 1918	Kč 4.50
Časopis »La Progreso«, roč. 1919	Kč 6.—
Tittl: Krátká mluvnice Esp.	Kč 0.30
Čejka: Slovník esp.-český, brož.	Kč 7.80
Čejka: Slovník čes.-esperantský	Kč 3.30
Čejka-Krumpholz: Podrobná mluvnice Esperanta	Kč 7.30
Čejka-Krumpholz: Malá mluvnice Esperanta	Kč 3.10
Esp. movado en Moravio	Kč 4.—
Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár.	Kč 0.80
Jazyk všeslovanský a Esp.	Kč 0.20
Kühnl: Úplná učebnice esperanta: c) vazba v plátěném hřbetě	Kč 14.40
Kühnl-Procházka: Slovník česko-esper.: b) brožovaný	Kč 18.—
Vortoj de Zamenhof, na lepším papíře	Kč 6.—
Sherlock Holmes	Kč 4.50
J. S. Machar: Benedek	Kč 3.60
Gvidlibro tra Praha	Kč 3.60
Výtah z Kotzina: Na obranu esper.	Kč 2.40
Co je esperanto	Kč —.20
Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo	Kč 20.—
E. Privat: Vivo de Zamenhof	Kč 48.—

Via horloĝo funkcios precize se vi ĝin donos por rebonigi al



FR. NOVÁK,
horloĝisto en Praha I.
Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp.
insignoj de esp. klubo en
Praha. - Esp. glumarkoj,
kolekto da 12 div. specoj,
100 pecoj Kč 4.—, aŭfrankite
Kč 5.—, 1000 pec. Kč 35.—,
aŭfrankite Kč 37-50.



LA PLEJ BONA
PIED VESTAJO

estas
ricevebla
ĉe firmo

Jos. Mráz, Plzeň V., Táborská 5.

FUMANTOJ ESPERANTISTAJ

Ĉu Vi jam fumas
„ESPERANTO“ cigaredtubetojn kaj paperojn?
Neokaze mendu tuj!

Eldonejo:

O. Günther,
Duchcov 4/9 Ĉ.

BULGARAJ ESPERANTISTOJ, ATENTU!

Baldaŭ aperos:

PLENA LERNOLIBRO DE ESP.

por memlernantoj kaj kursoj, kun komentario, ekzer-
caro, krestomatieto kaj frazeologio. Prezo 20 lv.

Jam aperis:

PLENA LERNOLIBRO DE ESP.

(kun fundamenta gramatiko),

aprobita de la Ministerio de publika instruado.
Prezo 30 lv. (por 2 ekz. 52 lv.)

Mendebla ĉe la aŭtoro: Ivan Krestanof,
gimnazia profesoro en Karlovo. (Bulgario).

BES-a Adresaro de esperantistoj

el ĉiuj landoj,

dua eldono 7.50 Kč (fremdlande 1.50 Fr. sv.)

Aliĝojn kaj anoncojn por nova (tria) eldono

oni akceptas sole ĝis 15/IV. 1921.

Aliĝa kotizo (kun senpaga ekzemplero) 8 Kč,
fremdlande 2 Fr. sv. — Nova eldono enhavos
ankaŭ liston de aliĝintoj al XIII.-a kongreso!

Bohema Esperanto- Servo,

Moravany,

Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul.
Presis: Laborista presejo, Plzeň.